

# SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

# La Espero

2021:3

Jen la infanoj.



Orfino legas.



Pro lito-  
manko li  
dormas sur  
ŝtonoj.



Por ke ili trovu ion por manĝi,  
ektransportas ŝtonojn en la ĉarumoj.



Legu pri la infanoj en la antaŭo numero de  
La Espero, 2021:2. Al la tiea teksto mankis la  
bildoj, kiuj nur lastatempe alvenis.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2021 • 109-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

**E-post till redaktionen:**

laespero@esperantoforbundet.se

**Ansvarig utgivare:** Bengt Olof Åradsson

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeration:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**E-post:** svenska@esperantoforbundet.se

**Nätsida:** www.esperantoforbundet.se

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123

**Medlemsavgift:**

Direktansluten medlem 200 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund. Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 070-6200846

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

**Plusgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.esperanto-gbg.org/eldona/

**E-post:** eldona@esperantosverige.se

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården,

680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.esperantogarden.se

**E-post:** info@esperantogarden.se

**Telefon:** 070 767 54 55

## Manus till La Espero

**sänds till** Bengt Olof Åradsson

Kungsgatan 13B, lgh 1201; 281 48 Hässleholm;

Tel 070-200 4574

**E-post:** laespero@esperantoforbundet.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Sommaren är över men styrelsen och andra "aktivuloj" har inte tagit semester. Arbetet med bl a omstruktureringen av medlemsregistret, förnyelse av våra hemsidor och arbetsverktyg, införandet av ett nyhetsblad som komplement till La Espero samt produktion av filmer till digitala mässor och vår YouTube-kanal har fortsatt. Vår plan att finnas på flera olika sociala plattformar fortsätter.

Alla direktmedlemmar har blivit kontaktade per telefon och/eller mail för att säkerställa att de fått kännedom om de nya reglerna för medlemskap som träder i kraft nästa år. Klubbstyrelserna har uppmanats att diskutera sina arbetsformer och föra ut information till sina medlemmar om de ändrade reglerna för medlemskap i SEF. Tyvärr läser inte alla denna spalt i La Espero och vi vill inte att förändringarna ska komma som en överraskning när det är dags att betala medlemsavgiften nästa gång.

## Tävling i Språktidningen

Under det gångna året har vi haft en annonsserie i Språktidningen i syfte att synas och öka kunskapen om esperanto. Vi avslutade denna serie med en ordfläta i sommarnumret som brukar ha en bilaga med olika språkrelaterade pussel och knåp. Vi fick in över hundra svar – samma som totalt antal svar under hela förra året – även flera veckor efter slutdatum, och de tio första har fått en varsin Lilla esperanto-ordboken som pris.

Några av dem kunde redan lite esperanto och några kände till det genom någon äldre släkting som varit aktiv. Det tyder ändå på att Språktidningens läsekrets är en bra målgrupp att rikta sig till!

Vi kommer att fortsätta annonsera i Språktidningen ytterligare en period, nu med upplägget som en liten nybörjarkurs med en lektion i varje nummer.

## Om nyhetsbrevet ALIT OM ESPERANTO

Vi har länge haft möjligheten att på hemsidan esperanto.se anmäla intresse för att få ett nyhetsbrev. Många har anmält sig men arbetet att sätta ihop ett nyhetsbrev och skicka ut regelbundet har tyvärr hamnat i skuggan av annat. Nu när vi börjar få ihop en redaktionskommitté hoppas vi kunna ta tag även i detta! Nyhetsbrevet är i första hand riktat till intresserade icke-medlemmar (men som förhoppningsvis blir det på sikt) men det är förstås fritt fram för medlemmar att prenumerera också!

**V**irtuala kongreso donas eblecon jen kaj jen vidi, kiel aspektas parteto de hejmo de homoj en aliaj partoj de la mondo. Stranga estas la sento, ke en tiuj etaj kadroj sidas homoj en plej diversaj partoj de la mondo, samtempe.

Nun jam okazis la dua VK de UEA, por anstataŭi tiujn UK (universalajn kongresojn) kiuj devis esti nuligitaj aŭ prokrastitaj per pluraj jaroj. En interreto estas kutimo ke ĉio estas iel senpaga, sed por tiu ĉi partopreno necesis almenaŭ esti individua membro de UEA, aŭ pagi simile. Iom pli ol 1800 personoj aliĝis, kaj tio estas simila nombro kiel por UK.

Mi partoprenis ĉiutage dum la VK-semajno almenaŭ unu programeron, kaj estis kontenta. Laŭ mia gusto mi elektis prelegojn de verkistoj pri siaj propraj libroj, prezentojn de lastatempaj novaj libroj, kantojn de Ĵomart kaj Nataŝa, prelegojn pri poŝtmark-kolektado kaj pri la muzeo de Vieno, la inaŭguron kaj fermon, kaj ankaŭ tion kio temis pri la laboro kaj ekonomio de UEA.

La prezidanto de UEA, Duncan Charters, sidis sur granda fotelo

en angulo de altaj librobretaj. Li bonvenigis, respondis al demandoj, diskutis. Multaj el la kunsidoj okazis je partoj de la tago kiu taŭgas por eŭropanoj, kiuj ne tre taŭgas por Ameriko, sed Duncan Charters estis senprobleme afabla.

Kiel publiko je la podiaj diskutoj aŭ prelegoj, mi povis skribi mallongan demandon, aŭ enskribi mallongan saluton. La teamo e@i, kiu kreis la programaron por la virtuala kongreso, deĵoris dum la publikaj prezentoj. Ili atentis, ke la demandoj ricevu respondojn. Post longa pripensado, mi skribis demandon en unu el la publikaj kunvenoj kun la estraro de UEA, pri la estonteco de kongresoj se pro la klimatsanĝo estos malpli da eblecoj flugi. Duncan Charters respondis, kun iomete da rideto al tiu demandema Ulla, ke ja necesas esti optimisto pri la kongresoj, kaj ke la estraro planas pri kongresoj. Sed je tute alia okazo li menciis, ke liaj filinoj laboras ĝuste pri grandaj kunvenoj, kaj ke ili preparas sin por "hibridaj" aranĝoj. Tio devus signifi konferencojn, kiuj okazas kaj fizike kaj virtuale.



**2<sup>a</sup> VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO**  
**17-24 de JULIO 2021**

## **"Paco kaj konfido: universalaj valoroj"**

El tio, kion mi plej multe ĝuis, estis prezento de Sten Johansson el Svedio, pri sia plej nova libro, kiu aperis ĉe la usona esperanto-eldonejo Mondial. Krome mi ĉiam tre ĝuas aŭskulti paroladon de Humphrey Tonkin, pri io ajn, ĉar li ĉiam bone pripensas kion diri, kaj diras tion klare.

Mi ankaŭ notis, ke mi aĉetu la novan libron kiun Anna Löwenstein verkis.

*Ulla Luin*

## Impresoj de surloka kongreso en Pollando

**P**ost longa hezito pro la pandemia situacio kaj decido je lasta momento, la estraro de KELI tamen decidis ke okazu kristana kongreso en Legnica, Pollando. Origine ĝi estis planita okazi en 2020, sed estis prokrastita unu jaron pro bonkonataj kaŭzoj.

Multaj ne-membroj kaj komencantoj de Esperanto partoprenis, verŝajne pro manko de aliaj kongresoj, do ili kaptis la okazon viziti enlandan esperantan renkontiĝon.

Kiel kutime, la programo enhavis prelegojn, diservojn, ekskursojn kaj kulturajn erojn.

Unu preleganto montris bildojn kaj rakontis pri sia pilgrimado inter Oslo kaj la katedralo de Nidaros en Trondheim.

Alia prelego nomiĝis "Kial ni ĉesis skribi leterojn". Mi ankaŭ kontribuis, per prezentado de Greta Thunberg kaj du paroloj de ŝi kun eo-tekstoj.

Sekvontjare, la kongreso okazos en suda Hungario.

*Bengt Olof Åradsson*



# Ĉu interesas vin labori internacie por Esperanto?

## Ĉu vi volas reprezenti Svedion en la Komitato de UEA?

**U**niversala Esperanto-Asocio estis fondita en 1908 kiel organizaĵo de individuaj esperantistoj. Nuntempe UEA estas la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto kaj havas membrojn en 120 landoj.

UEA laboras ne nur por disvastigi Esperanton sed ankaŭ por vekti diskutojn pri la monda lingvo-problemo kaj atentigi pri la neceso de egaleco inter lingvoj.

Ĝia Statuto listigas jenajn kvar celojn:

- disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto
- agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon
- plifaciligi la ĉiuspecajn spiritaĵojn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo
- kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

**Universala Esperanto-Asocio**  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

UEA

Aliĝoj | Kongresoj | Delegita reto | Revuoj | Katalogo | Via spaco

La Komitato estas la supera gvid-organo de UEA. Ĝi havas la rajton fari ĉiujn decidojn pri la direkto de la agado kaj pri unuopaj agadoj. Ĝi ankaŭ rajtas fari ĉiujn decidojn pri administrado, financaj planoj, ktp. La komitato kunsidas ĉiujare dum la Universala Kongreso kaj laboras perpoŝte, plejofte rete per la komitata listo ([komitato-de-uea@groups.io](mailto:komitato-de-uea@groups.io)), dum la cetero de la jaro. Povas okazi interretaj voĉdonoj pri diversaj decidoj.

Komitatano tenu kontakton kun la estraro de SEF, raportu pri gravaj diskutoj en la komitata listo aŭ dum kunveno, kaj informi pri la opinio de la estraranoj de SEF antaŭ gravaj decidoj en la Komitato. La komitatoj havas trijaran oficperiodon. La venonta periodo komenciĝos en 2022.

*Komitatanon A* nomas la landaj asocioj (proporcie al la membronombro), aliĝintaj fakaj

asocioj (po 1), TEJO (2) kaj la observantoj (po 1).

*Komitatanon B* elektas la individuaj membroj.

*Komitatanon C* elektas la komitatoj A kaj B por havi en la Komitato personojn kun aparte bezonataj spertoj.

Observantoj reprezentas la landajn asociojn kun malpli ol cent membroj.

Pli detale pri la komitato kaj komitatoj legu en la Statuto de UEA kaj la Ĝenerala Regularo de UEA.

Komitatano por Svedio estas Ann-Louise Åkerlund, kies mandato finiĝos venontjare (2022). Se interesas vin transpreni la taskon, aŭ vi havas demandojn, bv kontakti ŝin per retpoŝto [annlouiseakerlund@gmail.com](mailto:annlouiseakerlund@gmail.com) aŭ la estraron de SEF per la adreso [svenska@esperantoforbundet.se](mailto:svenska@esperantoforbundet.se).

## Vortaro somerumas

**L**a laboro kontroli la enskribitan vortaron de Roland Lindblom iom somerumas. Diskuteto pri literoj Q, W, X, Y, kiuj ne troviĝas en la alfabeto de esperanto estas respondita de Martin Häggström, ke li planas enmeti ilin kune kun la finkontrolitaj literoj O kaj P.

Do, post tio atendas la finkontrolon de literoj A-Ĵ. Pri la superrigardo de la laboro respondecas Leif Nordenstorm.

*Ulla Luin*



Arkaika greka alfabeto. Nacia Arkeologia Muzeo de Ateno

## Alfabeto

**A**lfabeto (de la grekaj literoj ἄλφα [alfa] kaj βῆτα [beta]) estas aro da literoj uzataj en iu lingvo. Ideale ĉiu litero de alfabeto reprezentas unu fonemon (parolsonon), sed tipe ekzistas kombinoj de literoj, kiuj kune reprezentas unu fonemon. La Esperanta alfabeto nomiĝas *aboco* laŭ la tri unuaj literoj *a, b, c*.

Alfabeto estas la fina paŝo de la evoluo de skriboj, kiu alstrebas redukti la skrib-bildaron al eta aro da signoj: po unu signo, nomata "litero", por ĉiu fonemo. /Wikipedia

## Nolhaga-renkontiĝo kun Alströmer

La 11-an de julio membroj el la gotenburga esperanto-klubo renkontiĝis en la Nolhaga parko en Alingsås, najbara urbo de Gotenburgo.

La olda palaco brilis blanke pro la suno kaj la verda granda herbejo sub grandegaj arboj donis la etoson de la plej bela somera tago.

Jan Bondesson, alingsåsano, rakontis pri la historio de la Nolhaga Parko – aŭ la "Terpoma parko".

Iam oni nomis terpomojn NOLOR – kaj tial la nomo de la parko. La onidiro sciigis, ke nobla vizitanto venos. Jes, "Jonas Alströmer" mem vizitos nin.

Multaj esperantistoj ja kolektiĝis sur la herbejo kaj atendis.

Esperanta flago flirtis en la vento.

Nun li venas, la terpoma reĝo! Ruĝa surtuto kaj blanka peruko. Li riproĉas la esperantistojn por ke ili ne manĝas terpomojn. Nur rizo, pastaĵoj kaj "suĉi".

Li regalas nin per novkuiritaj terpomoj, butero, pano, petroselo, ŝenoprazo kaj aneto.

Kiam ĉiuj manĝas terpomojn, tri el la partoprenantoj ludas bekflutojn, i.a. "Papilo flirtas en Nolhaga" ...

Poste ĉiuj trinkis kafon. La tempo flugis kaj la tre plaĉa evento estis je la fino.

*Ingegerd Granat*



Novaj esperantistoj lernas de tiuj, kiuj parolas pli flue. Duope aŭ triope la "novuloj ĉirkaŭas "spertajn esperantistojn".



## Ŝanĝoj en la klubo de Stockholm

La klubo de Stockholm faris ŝanĝojn de sia labormaniero dum la unua parto de tiu ĉi jaro 2021. Jam pli frue la klubo interkonsentis kun la estraro de SEF pri helpo de membrolisto kaj enpagoj de membrokotizoj.

Ĉi-jare la klubo fermis sian plusĝiran konton, kiun ĝi havis dum pli ol kvindek jaroj, kaj samtempe interkonsentis kun SEF kiel fari pri la mono en la kontoj de la klubo.

Fondaĵo kun nomo "Valhalla stipendiefond" estis donaco de Kerstin Kristoferson en la jaro 1998, kaj dum la unua deko da jaroj aŭ pli, ĝi donis rentumon per kiu la klubo povis doni

stipendiojn por partopreno en esperanto-aranĝoj. Lastatempe ne estis ebleco ricevi rentumon, kaj post kontakto kun Kerstin per telefono, la klubo petis al SEF, ke ĝi eniru la SEF-fodaĵon "NEK", kiu havas similajn celojn. La klubo de Stockholm dankas al Kerstin pro la donaco, kiu kontribuis al la agado de la klubo dum multaj jaroj.

La kluba kaso nun troviĝas en speciala librotena konto ĉe SEF. Enspezoj de la klubo estas parto de la membrokotizo, kaj elspezoj estos dissendo de la kluba membrofolio "Ekspreso" kaj kostoj por kunsidoj. La estraro de SEF akceptis proponojn pri taŭgaj rutinoj por repagoj de kvitancoj

kelkfoje jare el tiu librotena konto. Dissendo de "Ekspreso" al klubanoj, per ret-letero aŭ per papero, estas nun farata de Agneta Järnlström.

Kiam SEF en majo ĉi-jare decidis pri ŝanĝo de la membrokotizoj, la klubo decidis ke kluba kotizo estu iom pli alta ol la SEF-kotizo, sed ke la klubo havas la saman principon de la kotizoj kiel SEF, samtempe la klubo decidis, ke se SEF trovas membrojn en sia registro, kiuj loĝas en la regiono de la klubo, ili estos bonvenaj dum la unua jaro sen kroma pago de kotizo.

*Ulla Luin*



Demokratin i EU

Utbildning, kultur,  
ungdomsfrågor och idrott

Andra idéer

Värden och rättigheter,  
rättsstatsprincipen, säkerhetKonferensen  
om Europas  
framtid

Saluton, karaj Esperanto-parolantoj, kiel vi eble jam eksciis, Eŭropa Unio pripensas sian estontecon, kadre de estonteco-konferenco kiu daŭras ekde majo 2021 dum unu jaro. En la aktuala unua fazo de la pripensado civitanoj rajtas meti proponojn kaj subteni tiujn de aliaj.

Estas bone por ni Esperanto-parolantoj kaj por nia lingvo, se en tiuj pripensoj oni konsideras ankaŭ Esperanton. Sekve sur la paĝoj de la estonteco-konferenco

estas multaj proponoj pri Esperanto. Mi alvokas vin subteni almenaŭ unu el tiuj, se vi ne jam faris (bv. elteni por tio la iomete komplikan aliĝoproceson).

Diversaj proponoj celas la enkondukon de Esperanto, la instruadon de Esperanto kiel celo en si mem aŭ kiel unua ŝtupo por lerni aliajn lingvojn.

Mi mem havas la impreson, ke unue necesas bazaj ŝtupoj; sube miaj proponoj.

Mi tre ŝatus, se vi subtenus unu aŭ plurajn el miaj proponoj.

Mi ankaŭ bonvenigas diskutojn kun vi pri la proponoj. Se mi ne reagas al via komento en iu retlisto, bv. rekte alskribi min; eble mi pretervidis.

Ĉion plej bonan al vi kaj multan ĝuon de nia komuna lingvo Esperanto :)

*Lu Wunsch-Rolshoven*

Komisiito pri gazetaro kaj publikaj rilatoj de Germana Esperanto-Asocio  
EsperantoLand, prezidanto

**Oficiale rekoni Esperanton flanke de Eŭropa Unio**

kiel unu el la lingvoj de Eŭropaj civitanoj:

[tinyurl.com/f5ram5ur](https://tinyurl.com/f5ram5ur)

**Oferti unu aŭ du lerneajn instru-horojn pri Esperanto**

al kiel eble plej multaj lernejoj en Eŭropo:

[tinyurl.com/y5nfym5j](https://tinyurl.com/y5nfym5j)

**Objektive informi pri Esperanto**

kaj samrajte trakti Esperanto-parolantojn pri lingvaj aferoj en EU:

[tinyurl.com/4mfeuczv](https://tinyurl.com/4mfeuczv)

**Konscii pri la lingva diskriminacio ene de Eŭropa Unio**

kaj pri ĝiaj konsekvencoj por la demokratio en EU:

[tinyurl.com/2t4ynp8d](https://tinyurl.com/2t4ynp8d)



**Digital  
språkdag  
även i år**

Den europeiska språkdagen infaller den 26 september. Dagen instiftades av Europarådet i samband med det europeiska språkåret 2001 för att främja vikten av språkkunskaper och framför allt nyttan av flerspråkighet.

I Stockholm har språkdagen de senaste åren firats i form av ett språkcafé i Europahuset för skolelever på högstadiet och gymnasiet. Eleverna får komma klassvis vid förbokade tidpunkter under dagen och får korta språklektioner, "smakprov" på språken som deltar.

Evenemanget arrangeras av Europeiska kommissionens representation i Stockholm, i samarbete med flera ambassader och kulturinstitut, men också vi från Svenska Esperantoförbundet har

varit med i många år: inte bara som deltagare utan även som medarrangörer.

### Inte bara europeiska språk

Namnet är kanske lite förledande då det inte bara handlar om enbart europeiska språk, utan alla språk, även om fokus kanske ligger på språk som talas i Europa – stora som små. Esperanto brukar representeras av några medlemmar i Stockholmsklubben.

### Digitalt även i år

På förekommen anledning så blev evenemanget förra året webbsänt i stället för att tillåta besökare på plats. Varje organisation fick då sex minuter var att hålla en presentation om några utvalda detaljer av sitt språk. Till

exempel speciella bokstäver i alfabetet, ordspråk eller talesätt och deras motsvarigheter på svenska, eller "falska vänner" – ord som låter likt något på svenska men betyder något helt annat.

Upplägget i år blir under likartade former. Det är förstås mer interaktivt att prata med elever och lärare och svara på frågor än att hålla en enkelriktad presentation, men en fördel med den digitala tekniken är att skolor från hela landet kan ta del av presentationerna, inte bara skolor i Stockholmsområdet.

*Olof Pettersson*

Läs mer:

<https://tinyurl.com/zb2pyrmm>

Titta på webbsändningen från 2020:

<https://tinyurl.com/3xd7t839>

# La strato de dolaro – “Dollar Street”



## Dollar Street

Imagu la mondon kiel straton ordigitan laŭ enspezoj. Ĉiuj loĝas ie laŭlonge la straton. La plej malriĉaj vivas maldekstre kaj la plej riĉaj dekstre. Ĉiuj aliaj loĝas ie inter tiuj polusoj. Dollar Street estis inventita de Anna Rosling Rönnlund ĉe Gapminder. Dum 15 jaroj ŝi pasigis siajn labortagojn faciligante komprenon kaj uzadon de tutmondaj publikaj datumoj.

Kun la paso de tempo ŝia frustrigo kreskis: zorge elektante datumojn por prezenti ilin en buntaj kaj kortuŝaj leteroj faciligis la komprenon de ĝeneralaj tutmondaj tendencoj kaj rilatojn. Sed ĝi ne komprenigis ĉiutagan vivon de malsamaj enspezaj niveloj. Precipe ne en lokoj malproksimaj de onia hejmo. “Homoj en aliaj kulturoj

ofte estas prezentataj kiel timigaj aŭ ekzotaj.” Anna klarigas: “Ĉi tio devas ŝanĝiĝi. Ni volas montri kiel homoj vere vivas. Ŝajnis nature uzi fotojn kiel datumojn por ke homoj mem povu vidi kiel aspektas la vivo sur malsamaj enspezaj niveloj. Dollar Street permesas al vi viziti multajn hejmojn tra la tuta mondo. Sen vojaĝi.”

Teamo de fotistoj ĝis nun dokumentis pli ol 264 hejmojn en 50 landoj. En ĉiu hejmo la fotisto pasigas tagon fotante ĝis 135 objektojn, ekzemple dentobrosojn de la familio aŭ ŝatatajn ŝuojn. Ĉiuj fotoj estas etikeditaj (hejma funkcio, familia nomo kaj enspezo).

Dollar Street estas disvolvita de Gapminder, kiu estas sendependa sveda fondaĵo sen politikaj, religiaj aŭ ekonomiaj allig-

itecoj. La fondaĵo batalas kontraŭ detruigajn miskomprenojn pri tutmonda evoluo per sia faktobazita mondkoncepto, kiun ĉiuj povas kompreni.

La fondaĵo produktas senpagajn instruajn rimedojn bazitajn sur fidindaj statistikoj, kaj kunlaboras kun universitatoj, UN-organizaĵoj, publikaj agentejoj kaj neregistaraj organizaĵoj.

Bonvenon viziti ĉiujn hejmojn laŭlonge Dollar Street!


Per la permesilo 4.0 de Creative Commons, vi rajtas reuzi, redakti kaj dividi la bildojn de Dollar Street.

Ni esperas, ke vi ĝuos ĝin!

*tradukis B. O. ÅRADSSON*

Vizitu:

[www.gapminder.org/dollar-street](http://www.gapminder.org/dollar-street)



**Daŭripovaj evoluigaj celoj de UN**

**GLOBALA MÅLEN**  
för hållbar utveckling

La evoluo de la monda malriĉeco inter la jaroj 1990–2015.

Jaro	Malriĉeco (Indekso)
1990	~38
1999	~28
2008	~18
2012	~12
2015	~10

**Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.**

## Programpunkter:

15/9 kl 18.00 – Rum för motstånd – motkrafter då och nu. Vad är hoppet? En debatt kring frågor om motkrafter till det onda, hur motståndet ser ut idag jämfört med förr. Med Lisa Bjurwald, författare; Daniel Poohl, stiftelsen Expo; Svante Weyler, skribent.

22/9 kl 18.00 – Motstånd och räddning – Svenska hjälpsatser i Budapest under Förintelsen. Koppling till vår samtid, flyktingpolitik och människosyn. Med Karin Kvist Geverts, docent; Laura Brander, fil dr.

23/9 kl 18.00 – En bortglömd hjälte – Valdemar Langlet i andra världskrigets kaotiska Budapest. Ågnes Harrach, Langletkännare.

25/9 kl 13.00  
Finissage med Peter Wallensteen, seniorprofessor.

**R**um för motstånd är en utställning av journalisten / författaren Anna Franklin och konstnären Erika Bengtsdotter. Den är vårt bidrag till vikten av yttrandefrihet, mänskliga rättigheter, fred, civilkurage och motstånd mot onda krafter såsom rasism, antisemitism och terror av olika slag. Enskilda individers agerande, okända eldsjälarna som har gjort skillnad, lyfts fram.

Här presenterar vi Nina och Valdemar Langlet, ett par med stort mod och civilkurage, vanliga människor vars insatser räddade tusentals från död och tortyr under andra världskriget. En humanitär gärning som inte fått den uppmärksamhet som den förtjänar.

Dåtidens värld sätts in i en kontext av idag, 76 år efter freden. Vi ser fortsatt antisemitism, rasism, censur och brist på civilkurage och mänskliga rättigheter som inte respekteras. Det som skedde då, sker även idag och farligast är tystnaden.

Vi ser många likheter med det som hände under andra världskriget och skrämmande rapporter från bland annat Ungern visar på just detta.

Hur ser motståndet ut idag? Finns det några motkrafter och vad är hoppet?


Attacken mot satirtidningen Charlie Hebdo 2015 i Paris ingick i en våg av terror i världen med bland annat IS och självmordsbombare. De hade även antisemitiskt syfte. Nationalism och främlingsfientlighet ökar idag.

Vi ser allt fler diktaturer där yttrandefrihet och mänskliga rättigheter inte existerar, där demokratiska värderingar ifrågasätts. Ungern och Polen är länder med regimer som representerar en auktoritär högerradikal utveckling i Europa. Aggressiva utspel och propaganda mot judar har resulterat i att den antisemitiska retoriken har stegrats.

Hoten har ökat mot människor beroende på etnisk bakgrund, religiös tillhörighet eller sexuell inriktning och mot de som står upp för mänskliga rättigheter.

Men alla kan göra skillnad, förändra och ingripa i situationer, ha civilkurage. Det behövs alltid människor som har mod att handla – ett föredöme även i det lilla.

Rum för motstånd är vårt bidrag till en bättre värld – att få människor att beröras och reagera, få sig en tankeställare. Vårt budskap är att försöka förstå vart vi är på väg idag, ifråga-



sätta. Se vad vi kan göra annorlunda i världen.

Hoppet och motståndet mot farliga krafter finns. Men de som deltar aktivt skulle behöva vara fler!

Utställningen Rum för motstånd bygger på en mycket tät dialog mellan oss som står bakom innehållet, ett arbete tillsammans i alla led; bild och text, installationer både ute och inne och ett gediget program med föredrag och en debatt. Se bifogat program.

Invigning skedde 29/8 av ärkebiskopen Antje Jackelén.

Plats: Litteraturens hus/Åhuset-Valdemar Langlets park  
Tider: 29/8-26/9 – ons-sön 12-16

Läs mer:  
[www.litteraturcentrum.se/post/rum-for-motstand](http://www.litteraturcentrum.se/post/rum-for-motstand)



## Kluba prezidanto en alia lando

**L**a prezidanto de la klubo de Stockholm, Tatu Lehtilä, Ledziĝis ĉisomere al Karina Oliveira el Brazilo, kiu nuntempe instruas en universitato en Sud-Koreio. Karina estas estrarano de TEJO ekde 2019 ĝis aŭgusto 2021, kiam nova estraro de TEJO ekofikas. Tatu kaj Karina kune ekloĝos en Sud-Koreio por labori tie dum kelkaj venontaj jaroj, sed iel partoprenos ankaŭ en la klubo laboro de Stockholm.

*Ulla Luin*

Tatu Lehtilä kaj Karina Oliveira, nov-geedzoj 2021. Fotis Karina mem.

